

BONA

ESPERO

volumo: 1983/20

eldonas: sudafrika esperanto-asocio

numero: 4

ISSN 0006-7024



Liberiĝu per Esperanto

BONA ESPERO

Revuo de la Sudafrika Esperanto-Asocio (SEA)
ISSN 0006-7024

Redaktoro: J.J. Zeelie
Sub-Redaktorino: A.K. Fouché

Tiu ĉi revuo trimonata aperas en marto, junio, septembro kaj decembro ĉiujare.

La redakcio preferas maŝinskribitajn kontribuaĵojn. Manuskriptoj ne publikigitaj ne resendiĝos. Nek la redakcio nek SEA respondecas pri la enhavo de anoncoj aŭ promesoj faritaj en ili.

Redakcia adreso: P.O. Box 12271
Centrahil
Port Elizabeth
6006

Prezo: Membroj de SEA - Senpage
Nemembroj - Abonu pere de la SEA kasisto:
P.O. Box 1227
Cape Town
8000

Estraro de SEA: Prezidanto - E. de Kock
Vic-Prezidanto - A. von Blottnitz
Sekretario - O. Sher
Kasisto - C.S. Beckford
Komitatanoj - H.W. Appel
A.K. Fouché
J. Hammes
F.M. Woolf

Ĉiuj asocioj, societoj, kluboj kaj aliaj, kiuj regule alsendas gazetojn, novaĵajn leterojn ktp, bonvolu sendi al la redaktoro de Bona Espero.

ENHAVO

Paĝo

Ĉefartikolo

Por Doni Sencon Al Nia Propra Esperantisteco	1
--	---

Artikoloj Kaj Rakontoj

Tiom Riĉa Mi Estas	5
Raporto: PEK	6
Grandiozaj Konstruaĵoj	7
Okulaĵoj	8
La Afiŝo Efika	9
Esperanto-Vortaro En Televido	10
Inter La Steloj	11
Nova Universitata Grupo	13
Dek Devoj De Bona Esperantisto	17
Multo En Vorto	18
Ĉu Oni Okazigos Estontecajn Konferencojn	
Pere De Videotelefonoj?	18
La Kancerkliniko	19
Venter Kontraŭ La Kancerkliniko	21
Medicina Progreso - Beno Aŭ Problemo?	23
Internacia Ligo De Esperantistaj Instruistoj (ILEI)	24
68-A UK: Budapeŝto 1983	33
69-A UK: Vankuvero 1984	33
Jarkunveno De La Sudafrika Esperanto-Asocio	34
Mallonge El La SEA-Kunveno: 83 10 20	35
BBC Kaj Esperanto	37

Rubrikoj

El La Scienco	11
El Nia Poezio	13




LA REDAKCIO DEZIRAS AL ĈIUJ SIAJ LEGANTOJ

FELIĈAN KRISTNASKON

LA ĜOJO DE TIU ĈI FESTA TAGO REFLEKTIĜU EN

PROSPERAN NOVJARAN



ĈEFARTIKOLO

Kvankam nia ĉefartikolo kutimas esti multe malpli longa, la redakcio decidis aperigi la tutan artikolon, kiu aperis en ESPERANTO de junio 1983 (p. 101):

POR DONI SENCON AL NIA PROPRA ESPERANTISTECO

Vi eble trovos, ke estas troigo doni unuarangan atenton en ĉi tiu revuo al la progresoj de Esperanto en Afriko dufoje ene de nur unu jaro. Ni faris tion en nia julia/aŭgusta numero pasintjare, kaj jen ni faras tion denove. Ni do eventuale malsamopinias kun vi eĉ ĝis tiu grado, ke ni nun volas lanĉi konstantan rubrikon pri la Esperanto-movado en tiu kontinento. Vi tial povas atendi en ĉiu aŭ preskaŭ ĉiu revunumero ĝis la fino de la jaro "afrikan" artikolon, kiu prezentos al la legantaro la movadajn progresojn en unuopaj landoj de Afriko.

Estas multaj kialoj por agi tiel. Ni provu listigi nur kelkajn el ili:

Tra la tuta ĝisnuna - kaj kiel vi scias: preskaŭ centjara - historio de Esperanto, Afriko ĉiam estis la plej malforta ĉenero en la tutmondeco de la Internacia Lingvo. La kaŭzoj de tia stato estis unuavice historiaj kaj truditaj de ekstere. Intertempe Afriko preskaŭ komplete liberiĝis kaj fariĝis unu el la plej dinamisme evoluantaj mondpartoj. La afrikaj popoloj komencis reserĉi sian propran kulturan identecon kaj siajn proprajn lingvojn kaj interkomprenilojn. Tiu retrovo de la propra identeco kaj ĝia defendo fariĝis dum la lastaj jardekoj parto de la gvidsloganoj ankaŭ de la Esperanto-movado. Ne estas malfacile kredi, ke ni ĉi tiel modifis nian propran ideologian bazon kaj adoptis tiujn ideojn ĝuste pro la ĉeesto de nova Afriko sur la monda scenejo. Tamen, ni dum jardekoj faris nenion esencan por disvastigi la Internacian Lingvon en Afriko. Ni sidis kaj atendis, ke Afriko malkovru nin.

Pro la komplekseco de sia propra lingva situacio, Afriko

devus kompreni niajn ideojn pri la neceso de komuna lingvo, pri lingva egalrajteco, pri lingva kaj kultura diskriminacio, multe pli bone ol tio okazas en la aliaj landoj. Ankaŭ la relativa noveco de Esperanto ne devus esti ĝena por Afriko, ĉar la plimulto de ĝiaj lingvoj spertas renesancon kaj novecon de sia speco. Sed, malgraŭ tiu implicita kompreno kaj fekundeco de la grundo, ni faris malmulton antaŭe por utiligi ilin kaj por ĝermigi Movadon en Afriko.

Ni bezonis amason da jaroj por kompreni, ke ni ekiros de nulo en Afriko nur kiam ni havos afrikanojn mem, kiuj fariĝos la portantoj de la internacilingva movado en la kontinento. Ĝuste tiaspeca evoluo okazas dum la lastaj kelkaj jaroj. Afrikaj esperantistoj jam ekzistas. Plej ofte ankoraŭ temas pri izolitaj lernantoj, precipe en nordaj kaj saharaj landoj de la kontinento. Grupiĝo kaj organiziĝo de la lokaj esperantistoj okazas en Zairo, Ebura Bordo kaj - jam de pli frue - en Madagaskaro. Sur la sojlo de landa organiziĝo troviĝas ankaŭ grupoj en Senegalio, Benino, Gano, Nigerio, Kamerunio, Zambio, Kenjo kaj Ruando. Dum la lastaj du monatoj venis centoj da informpetoj el Tanzanio, kaj ĝi verŝajne nun estas tiu afrika lando en kiu plej multe da komencantoj klopodas akiri la bazan scion de Esperanto.

Vi povas kompreni, ke estas necesa grandega fortostreĉo, homa kaj financa, por teni kaj evoluigi la nunan intereson pri Esperanto en Afriko. Ankaŭ UEA estas nur parte preparita por tia grandega tasko. Tio aparte koncernas la malnovan Fondaĵon Azio-Afriko, kiu iam malsukcesis taŭge elspezi eĉ kelkajn centojn da guldenoj jare, kaj al kiu nun ne sufiĉas pluraj dekmiloj da guldenoj de januaro ĝis decembro. Ne vere temas pri inflacio, sed pri vera inundo de informpetoj kaj korespondaj lernantoj en tuta aro da afrikaj landoj. Ni ne petos ĉi tie monkontribuojn, des pli ke tion faras aparta teksto en ĉi tiu revunumero. Ni volas tiri vian atenton al alia aspekto de la klopodoj disvastigi Esperanton en Afriko.

Oni ja ĝenerale estas esperantisto pro tio, ke oni havas almenaŭ iom da internaciisma eduko, ke oni estas disĉiplo de internacia kunlaboro, ke oni emas rigardi la mondon kaj la homaron kiel unu tuton, kaj ne kiel aron da izolitaj, memsufiĉaj popoloj kaj ŝtatoj. Se estas tiel, tiam oni nek povas nek rajtas sidi en sia loka Esperanto-klubo, kunveni unufoje semajne aŭ monate, kaj montri nenian intereson pri la evoluo kaj problemoj de la tutmonda Esperanto-movado. La Internacia Lingvo akiras sian sencon nur se ni agas por ĝi internacie, se ni praktikas ĝin internaciskale. La lumbildojn pri la feriaj vojaĝoj oni ja povas rigardi ankaŭ en alia loka klubo (naturamika, ekzemple), sed ili ne rajtas fariĝi la tuta senco de nia esperantisteco.

Ne ĉiu povas agi internacie, vi dirus. Necesas ankaŭ ia loka laboro. Jes, estas tiel, sed ankaŭ tiu loka agado por Esperanto akiras sian sencon, nur se ĝi estas parto de internacia, tutmonda klopodo solvi la problemon de la monda komunikado pere de la Internacia Lingvo. Eĉ se ni plene esperantigas la lernejon, fabrikon, urbon aŭ landon, kie ni studas, laboras aŭ vivas, tio ne havas multan sencon, se io simila ne okazas ankaŭ en Afriko kaj aliaj kontinentoj. Estas granda iluzio kredi, ke Esperanto povos atingi sian finan celon - la ĝeneralan akceptiĝon kiel internacia komunikilo - sen ke ni ankaŭ en Afriko atingu minimume tian disvastiĝon de la lingvo, kian ĝi spertas en la aliaj partoj de la mondo. Oni ne plu povas - feliĉe! - trudi al Afriko decidojn de ekstere. Afriko nun mem pensas kaj decidas, ĝi do devas agi laŭ siaj propraj sperto kaj konvinko. Ni tial ŝuldas ankoraŭ Esperanton al Afriko kaj ni devas doni prioritatan atenton al la disvolviĝo de la Esperanto-movado tie.

Hans Bakker kaj Renato Corsetti, du funkciuloj de UEA ŝargitaj pri la agado en Afriko, jam de kelkaj jaroj proponas ĝemiliĝon de Esperanto-klubo kaj asocioj el la aliaj kontinentoj kun la novaj grupoj en Afriko. Tion jam faris kelkaj kluboj en Francio kaj Svedio. En la 67-a UK en Antverpeno Bakker funkciigis apartan poŝtkartan ser-

von por kuraĝigi la afrikajn novulojn kaj ekkorespondi kun ili. Nun dekoj da esperantistoj tra la mondo regule kontaktas afrikajn lernantojn de Esperanto. Tiel ankaŭ tiuj dekoj da neaktivaj sciantoj de la lingvo fariĝis aktiva parto de la klopodo progresigi la Internacian Lingvon en Afriko. Tiel ili donis sencon al sia propra esperantisteco.

Ekzistas bezono por pliaj ĝemeliĝoj kaj korespondaj kontaktoj de tia speco. Se ankaŭ vi mem aŭ via loka Esperantoklubo volas doni sencon al via esperantisteco, se vi pretas transformiĝi de pasiva konsumanto de Esperanto al aktiva batalanto por ĝia disvastigo en Afriko, ne hezitu komuniki tion al: Hans Bakker, Kastelenstraat 231/II, 1082 EG Amsterdamo, Nederlando. Se vi faros tion, vi aŭ via Esperantoklubo ne nur grave helpos la tutmondigon de la Movado, sed vi donos tute novan dimension al via loka klubo aŭ grupo, kiu ĉesos vegeti kaj komencos vivi kaj fariĝi integra, aktiva parto de la internacia Esperanto-movado.



Subtenu la
tutmondigon de
Esperanto
per donaco al la
Fondaĵo Azio-
Afriko de UEA

TIOM RIĈA MI ESTAS

Ili rapide supreniras la ŝtupareton ĝis mia triĉambra domo en malnovaj vestaĵoj tro malgrandaj. Knabo kaj knabino.



"Ĉu vi havas kelkajn malnovajn ĵurnalojn por ni, sinjorino?"

Mi decidas ignori la demandon, sed rigardas iliajn piedojn nerimarkante la vizaĝetojn. Maldikajn sandalojn saturitajn de malvarma kaj malseka pluvo.

"Envenu, por ke mi povu doni al vi ambaŭ tason da varma, bongusta kakao" mi respondis anstataŭe. Iliaj sandaloj lasas makulojn sur mia malnova tapiŝo.

Kakao kaj rostpano kun marmelado, kontraste kun la

morda vento ekstere. Mi decidis daŭrigi la kalkuladon de mia turmenta buĝeto, kiu ŝajne neniam subtenas la dolorigan plialtiĝon de la prezoj.

La silento en la alia ĉambro preskaŭ fariĝas palpebla kaj mi decidas inspekti. La knabino alrigardas la malplenan tason

en ŝia mano. La knabo, lace kaj per maljuneca voĉo demandas: "Ĉu vi estas riĉa?"

"Riĉa?! Ho ve, tute ne." Mi rigardas la malnovajn meblojn, la truojn en la tapiŝo pro multjara surpaŝado....

La knabino zorge remetas la tason sur ties subtason: "Viaj tasoĵ harmonias kun la subtasoĵ." Ŝia voĉo estas tiu de knabino, sed plena da laco kaj malsato, tamen ne de la stomako.

Neniuj vortoj.

Ili foriras, ĵurnaloĵ firmaĵ sub la maldikaj, nekovritaĵ brakoĵ - vana provo por forigi la malvarmegon. Ili ne dankas min. Tamen, ili ja tiom pli diris: Ordinaraĵ tasoĵ malmultekostaĵ, sed kun parigitaĵ subtasoĵ!

Mi gustumas la solan manĝon por la tuta tago. Terpomoĵ kun saŭĉo. Varmajn terpomoĵ kun saŭĉo. Edzo kun malgranda salajro, sed daŭra ofico. Ankaŭ tioĵ ĉi estas parigitaĵ.

La kotaj makuloĵ ankoraŭ restas sur mia tapiŝo. Mi lasos ilin tie por memorigi min pri miaĵ riĉaĵoĵ.

De ekstere aŭdiĝas la dolĉaj voĉoĵ de Kristnaska ĥoro: "Paca nokt', Silenta vesper'....."

RAPORTO DE LA PORTELIZABETA ESPERANTO-KLUBO

Dum la pasinta jaro (aprilo 1982 - marto 1983) la klubo regule kunvenis ĉiun monaton. Aperis en la Teknikon Jarlibro artikolo pri Esperanto de s-ro C. Zeelie. Tio ĉi rezultis en plua artikolo verkita de ĵurnalisto de "Beeld" (83 03 10). Privata lernantino de s-ino A. Fouché, kaj matrikulanto de Theodor Herzl altlernejo, verkis afrikansan paroladon pri Esperanto kiun ŝi prezentis buŝe pro ekzameno. La titolo estis "Komunikado".


A. Fouché (Sekretariino)

GRANDIOZAJ KONSTRUAĴOJ

Spacomanko kaŭzis, ke la enloĝantoj de la grandaj usonaj urboj laŭlitere ekloĝu unuj supre de aliaj. Tamen, nubskrapuloj ne estas novaĵoj. La unuaj troviĝis jam en la tagoj de la Roma Imperio, kiam ekzistis multaj kelketaĝaj konstruaĵoj. La plej altaj je tiu tempo havis ĝis kvin etaĝojn.




Plej fama el la modernaj mult-etaĝaj konstruaĵoj estas la Empire State Building, kiu finkonstruiĝis en 1931. Ĝi etendas ĉielen ĝis 1250 futoj (375 metroj). En 1970 - preskaŭ kvardek jarojn poste - la futura World Trade Centre superis tiun rekordon per 100 futoj (1350 futoj = 405 metroj). Ĉar rekordoj ekzistas kiel defioj, la WTC flankenpuŝiĝis en la duan lokon de la 110-etaĝa Sears Tower. Tiu ĉi turo je 1450 futoj, estas la plej alta konstruaĵo en la mondo. La ST estas grandioza kaj havas oficejan spacon por 16500 homoj sur 101 akreoj da



Sears Tower, 1973.

planko. Pli ol 17000 tunoj da ekipaĵo certigas konstantan, ĉiujaran temperaturon de 22°C. Ĝi havas sian propran elektrodonan sistemon.

Kvankam ne tiom alta, la



plej multekosta konstruaĵo en la mondo estas la Sydney Opera House. Kiam konstruado komencis en 1959, oni kalkulis la tutan koston je R100 000 000 kaj la konstrudaŭron je du jaroj. Tamen ĝi ankoraŭ ne finkonstruiĝis - kvankam ĝi oficiale malfermiĝis - en 1973, dek kvar jarojn poste! Same la tuta kosto ne restis konstanta. Laŭ novaj kalkuladoj, la kosto proksimiĝos al R110 600 000. Neniu alia konstruaĵo bezonis tiom da tempo kaj mono por ĝin starigi. Plejmulton de la tempo kaj mono necesigis la pezega tegmento de 26 800 tunoj.

OKULAĴOJ

Ofte oni diras, ke la okuloj estas la fenestroj de la animo. Kiel vere!

"Ho, ve! Ŝi portas la saman robon!"



"Psst! Ĉu vi silentos pri sekreto?"



"Mi avertis, ke vi ne trinku tiun lastan viskion."



"Kien ĝi foriris?"



"La aŭto havis akcidenton, Karulo...."



"Mi sciis, ke mi ne estus ĝuinta la duan porcion....."



"Ne moviĝu! Ĝi supreniras vian kruron!"



"Estis birdo, ne mi..."



"Kia belulino!"




"Malseka koloraĵo sur la benko"



LA AFIŜO EFIKA

Por efika komunikado oni ne ĉiam bezonas multekostan modernan aparataron. Se vi iras en la stratoj aŭ atendas en stacidomo, ĉie vidiĝas ekzemploj de unu el la plej malnovaj, plej simplaj formoj de komunikado: la afiŝo. La afiŝo estas grava komunikilo por esperantistoj, kiuj ofte uzas ĝin por anonci kursojn. Do, indas lerni kiel uzi ĉi tiun ilon en la plej celtrafa maniero.

Kiel krei afiŝon, kion vi deziras? soj, kiujn eldonla Brita Konsilano Sekureco en sia (feb. 1983). Ĉi aparte rilatas al kureco. Demandu vi celas? Estas efike malgrandan ĉiudirekte kaj Altiru la atenvian tempon se vian anoncon. fotojn, fortajn plajn liniojn, ĝojn.



Lumafiŝo en stacidomo de Rotterdam, Nederlando

kiu faros tion Jen kelkaj pensis antaŭnelonge taro por la revuo SEKURECO tiuj konsiloj afiŝoj pri servin mem: kiun pli bone trafi grupon ol celi trafi nenium. ton. Vi perdos neniu legos Uzu frapantajn kolorojn, simkonatajn viza-

Ne ŝoku. Tio nur Oni fermos la

forĝesos. Ne komencu per "Ne". Vi pensigos pri instruisto, kiu levas la fingron por malpermesi al infano. Celu doni klarigon, kiun oni povos kompreni facile. Estas multe pli bone skribi "Levu pezajn objektojn uzante la genuojn kaj ne la dorson" ol skribi "Levu pezajn objektojn zorge". Ĉiu deziras levi sen malsaniĝi, sed necesas klarigi kiel tion fari.

Veku intereson. Oni vidos vian afiŝon nur dum momento, sed ripete. Memoru, ke nura afiŝo ne povas ŝanĝi kutimojn. Ne kedu, ke simple kovri muron per afiŝoj kaŭzos miraklon.

maltrankviligos. okulojn kaj

ESPERANTO-VORTARO EN TELEVIDO

La 23-an de decembro, en la novaĵelsendo de la japana tele-
vido, oni prezentis la eldonon de nova Japana/Esperanto-
Vortaro eldonita de Japana Esperanto Instituto kaj kompili-
ta de Miyamoto Masao: reage jam venas mendoj ĉe JEI. La
saman informon elsendis la radia ĵurnalo.

SUDAFRIKA SEA ESPERANTO
ASOCIO

(Informpetilo)


Nomo:

Adreso:

.....

Urbo: Kodo:

ELTRANĈU KAJ SENDU AL: LA SEKRETARIO, SEA,
BRONKHORSTSTRAAT 75, GROENKLOOF, 0181 PRETORIA

EL LA SCIENCO

:Plej multaj bakterioj duplikatas sin unufoje en ĉiu duono de horo. Unu organismo, kiu ekduplikatiĝas je la naŭa horo antaŭtagmeze, do fariĝas 70 000 000 je la naŭa posttagmeze - tio estas 12 horojn poste.

:La diferenco inter la plej alta kaj malplej alta pintoj sur la surfaco de la tero estas ĉirkaŭ 20 kilometroj.

La homa korpo enportas ĉirkaŭ 80 000 kilometrojn da sangangioj.

La vorto 'arterio' estas misnomo. Ĝi estiĝis el la greka vorto por 'ventotubo'. Kiam la antikvuloj anuafoje dissekciis la homan korpon, ili trovis sangon en la vejnoj sed la arteriojn - de kie pumpiĝas la sango - malplenaj. Ili opiniis, ke la arterioj portas venton (aeron).

La plej varma loko surtera estas Al-Azizyah en Libio: 58°C en la somero. La plej malvarma estas Vostok en la antarkto: -90°C en la vintro. (Akvo bolas je 100°C kaj glaciĝas je 4°C)

La tero nuntempa surhavas 1 400 000 animalajn kaj 500 000 vegetalajn specojn. Tamen, tiuj ciferoj reprezentas nur 1% de ĉiuj animalaj kaj vegetalaj vivoj, kiuj ĝis nun ekzistis sur la tero. La cetero malaperis.

:La homa okulo kapablas distingi 17 000 malsamajn kolorojn.

INTER LA STELOJ

La entuziasmuloj pri la spacvojaĝado konstatas, ke en la grandaj spacoj inter la planedoj la gravito tiom minimumiĝas, ke ĝia forto, kompare kun la forto sur aŭ ĝis relative malgranda distanco ekster iu planedo, reprezentas preskaŭ neimageblan frakcion, alivorte la

"tiro de la tero" je objekto troviĝanta en la fora, ekstera spaco estus, laŭ praktika vidpunkto, nemezurebla.

Tiu fakto estas tre kuraĝiga, ĉar la raketŝipo, kiu estas pafita je granda rapideco en la spacon, tie nek renkontos frotreziston (ĉar la spaco estas preskaŭ vakuo) nek estos mezureble malhelpata de la gravito. Do, ĝi konservos sian rapidecon sen la neceso elspezii plian puŝforton.

Sed, kio okazos rilate al la homo en la raketŝipo? Ankaŭ li perdos sian pezon, do ankaŭ en ĉiu parto de la korpo. Ne ekzistos por li supro aŭ malsupro, kaj lia centra nervosistemo ne plu ricevos mezaĝojn de la sennombraj sentoriceviloj, kiuj - en ĉiuj partoj de la korpo - reagis al la efiko de la gravito.

Ekzemple, por trinki akvon li devos unue konstati kie troviĝas lia mano! Li scios, kompreneble, ke ĝi estas je la brakfino - sed lia nervosistemo ne indikos al li laŭ kiu direkto etendiĝas lia brako. Li devos konstati do, per rigardo de la okuloj. Trovinte la manon, li fleksos la muskolojn kaj, zorge rigardante la fingrojn, li prenos suĉtubeton. Supozeble la akvo estos en botelo, sed pro manko de efika gravito ne estus eble elverŝi ĝin, eĉ se li renversus la botelon. Li devos, do, elsuĉi ĝin tra suĉtubeton. La muskoloj en la gorgo direktos la akvon en la stomakon. Ĝi ne falos tien, ĉar ĉe manko de efika gravito nenio falas.

Senĉese, do, dum ĉiu sekundo de la ĉiama sunlumo, li spertos tiajn malfacilaĵojn, kaj oni povas supozi, ke pri la ordinaraj funkcioj de la homa korpo li travivos malkomfortajn, ĝenajn, eĉ naŭzajn spertojn. Aldone li estos enkarcerigita en eta ĉambraro, kun nemultaj, sed neforigeblaj kunuloj, kaj dum la tuta vojaĝo li enspiros artefaritan, repurigitan aeron.

Kia freneziga afero.....

W.E.G.

EL NIA POEZIOLa Vera Frataro

Ne ekzistas landlimoj por la vera frataro,
 La vasta frataro tra tuta la mond';
 Nek monto nek valo, nek lando nek maro,
 Dividos nin longe de l'frata rond'.

Ne bezonas armilojn tiu granda frataro,
 La amo kaj vero sufiĉas por ĝi,
 Per ĉia bonfaro sur monda kamparo,
 Ĝi venkos estante fidela al si.

Vekiĝu homaro! Vi estas frataro,
 La suno briladas por tuta la rond';
 Agadu vi frate, amante, amate,
 La monda frataro por tuta la mond'.

Ho! Forto de l'mondo, Ho! Patro de l'rondo,
 La rondo gefrata, la ama ĉenar';
 Vastiĝu la rondo tra la tuta mondo,
 Ĝis plene fratiĝu la tuta homar'.


De Harrison Hill

Unuafoje publikigita en The British Esperantist,
 januaron, 1914

NOVA UNIVERSITATA GRUPO

Antaŭ nelonge estiĝis nova Esperanto-societo, nome ESPERANTO-TUKS, ĉe la plej granda sudafrika universitato. La novelektita prezidanto, s-ro J. Hammes, medicina studento, informas, ke la grupo ricevas subvencion de la student-konsilantaro ĉe la Pretoria Universitato, kaj rajtas varbi membrojn el la pli ol 16 000 studentoj de la universitato.

(al p. 26)

RECENZO

La Blinda Birdo

István Nemere.

Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 118p. 20cm.

ISBN 963 571 104 2. Prezo 15,00 gld.

"En lando, kiun oni ne rajtas forlasi kiam ajn sen malhelpo fare de la registaro - oni reguligas kaj kontrolas ankaŭ ĉiujn aliajn aspektojn de la vivo de ŝtatanoj, oni direktas ĉion laŭ kontraŭhomaj ideoj; do tie oni jam ne estas liberaj" (p.66). En LA BLINDA BIRDO Nemere rakontas, pri tute nuntempaj cirkonstancoj, pri nigrahaŭta verkisto, kiu senpermeso forlasis Sudafrikon kaj en internacia kongreso raportis pri rasa subpremo. Reveninte, li estas arestita. Sveda kongresamiko lia flugas al Sudafriko por enketi pri lia sorto. Li mire ekkonas landon, kie eblas aresti sen proceso, kie la polico mensogas eĉ pri la ekzisto de arestitoj, kaj kie ĉiu konsilas lin tuj hejmenvojaĝi. Kontaktinte la liberigan fronton, la svedo fine povas kontribui al perforta liberigo kaj eskapo de sia amiko. Atinginte sekurejon, la nigra verkisto tamen mortas pro la sekvoj de mallibereja torturo. La svedo ekcerbumas pri la prezo de lia liberigo: pluraj mortpafitaj policianoj kaj partizanoj. "Kaj ne ĉiu povus fuĝi. Oni devas ŝanĝi la kondiĉojn, por ke ĉiu povu vivi trankvile" (p.98). Tiuj pensoj rekte kondukas al cerbumado pri liberigo kaj revolucio. "Sed ĉiu revolucio fiaskos tiam, kiam ĝi.....venkas" (p.111).

Nemere uzas fikciajn geografiajn nomojn, sed pli ol klare estas, ke li direktas sian kritikon kontraŭ Sudafriko. Tamen, la bazaj ideoj de la romano ne limiĝas al rasapartigo, sed temas pli ĝenerale pri ŝtata maljusteco. Kaj la fikcia situigo de la okazaĵoj permesas kompreni tiujn ideojn, el kiuj mi citis la por mi plej cerbumigajn, kiel celitajn al la reĝimo de ne nur unu lando.

La dialogoj estas en elstara parola stilo.

Recenzis: Klaus Schubert (FR Germanio) en Esperanto
(julio, 1983)



RIDETU

- Vi havas la plej malŝaĝan hundon iam ajn videblan! Mi petis ĝin alporti la gazeton, sed anstataŭe ĝi komencis kafon kuiri!

- Ĉu vi sukcesis kapti la najbarlandan TV-stacion vespere? Ege distra estis ilia filmo, La Kiso.

- Nu, mi pli facile kaptis la najbaran sinjorinon por la kiso.

Grumblis la policisto kolere, ekzaminante rompŝtelon en vilao:

- Kie vi estis dum tiu nokto, kiam okazis tiu ĉi ŝtelo?

- Mi povas pruvi per kvar fidindaj atestantoj, ke tiunokte mi en alia loko partoprenis rompŝtelon.


- Terure! Mi aŭdas reveni mian edzon! Vestu vin urĝe!!

- Sed kial do? Laŭ la persona komputilo la probablo de lia surpriza reveno estis sub 0,01 procento....



Virinoj ja havas nur tri aĝojn: infanan, junulan, tridek-jaran, tridekjaran.....

... ..



— Ne profitu mian libertempon por telefoni al viaj antaŭmilitaj fianĉinoj! ...

.....



— Ĉiufoje kiam ni disputas, Karolĉjo alportas al mi ĉokoladetojn




...sonĝi Esperante.




Kaj se via kalkulaĵo ne estas pagita la 15-an de tiu ĉi monato mi lasos, ke vi frenezigu!

DEK DEVOJ DE BONA ESPERANTISTO

- P agi volonte kaj kun plezuro sian kotizon.
 R ekomendi la servojn de la lingvo al ĉiu, kiu povas
 ilin profiti.
 O rganizi sin kun la esperantistaro sialanda kaj
 eksterlanda.
 P orti en sia poŝo propagandajn libretojn kaj sur sia
 vestaĵo la verdan stelon.
 A boni kaj legi esperantajn gazetojn kaj revuojn.
 G vidi eksterlandan samideanon, kiu bezonas tian helpon.
 A ĉeti, ne nur pruntepreni literaturon por legado.
 N e lasi al la sekretario la varbadon de novaj anoj.
 D irekti la atenton de siaj konatoj al la praktikaj
 profitoj havigitaj per Esperanto.
 I nstrui la lingvon al novaj interesatoj.



Solvo sur p.28

MULTO EN VORTOĈU ONI OKAZIGOS ESTONTECAJN KONFERENCOJN PERE DE VIDEOTELEFONO

SIMENS en Munkeno jam provis eksperimentan videotelefonon por krei 'konferencan atmosferon' trans miloj da kilometroj. Du grupoj - partoprenantaj en la konferenco - konsistantaj el po kvar personoj sidantaj ĉirkaŭ speciala konferenca tablo estas ligitaj inter si per telefona kontakto. Ĉiu partoprenanto havas antaŭ si videotelefonon. Sur la ekranoj ili povas observi maksimume kvar el siaj kunuloj el la alia grupo.

Tiamaniere ankaŭ povas esti sendataj dokumentoj, fotoj aŭ figurataj apartaj partoprenantoj de la konferenco. Sono samtempe transsendiĝas per aŭ mikrofonoj aŭ megafonoj.

Por tiaj ĉi konferencoj taŭgas Esperanto plej bone. Esper-eble tio evidentiĝos baldaŭ post la unua tiaspeca konferenco!

LA KANCERKLINIKO

La Kancerkliniko (LKK) estas revuo opiniata de ĝia redakcio kiel 'politika, kultura, skandalema, ajnista'. Kaj tiel ĝi ja estas!! Tiu ĉi franca revuo estas tutsole por tiuj, kiuj havas nenion por diri. Se ankaŭ vi havas nenion por diri, kontaktu la redaktoron - li publikigos vian nenion senpage.

En la julia - septembra numero 27 (1983) aperis, krome de multaj aliaj sensencaĵoj, ankaŭ la jenaj:

paĝo 19



(Red. noto: vidu ankaŭ p. 21)

paĝo 27

IO-AJN

EL LA (VERE) FALSAJ MEMORAĴOJ
DE K. DO ADOLFO.

POST LA APERIGO EN LA GERTIANA
REVUO "STERN", DE (FALSAJ) MEMORAĴOJ
DE ADOLFĈJO (NJO?) ĈI. LASTA VIGLE REAGIS

LA STERN-KONIGO
ESTAS KON-STERNIGA!


ĈU IAM MIJ
VERAJ MEMORAĴOJ
EN STERNIGOS ANSTATAŬ
STERNIGI EN IŬ TIR-
KESTO?



TAMEN
MI HAVAS
"BONAN ESPERON"
POR KE IAM
ILI APERU...

Redaktora (la nova!) noto: Al LKK - Ni planas novan rubrikon
nomotan KLINIKO SENSENCA kaj rezervotan ĉefe por la kontribu-
antoj de via gazeto. Ĉu?!

Salutojn!!



VENTER KONTRAŬ LA KANCERKLINIKO

Respondas la aŭtoro de VENTERAĴOJ:

En la rubriko VENTERAĴOJ mi foje aludis al bildo de aĉaspekta surnubŝvebanta Dio sur la kovrilpaĝo de la fiaĉa gazeteto La Kancerkliniko (LKK). En posta numero de LKK oni klarigis, ke estis bildo de Zamenhof.

Flanke de tio, ke la Majstro - kiel poeto - prefere ŝvebin-tus pere de la poeta ĉevalo Pegaso, la bildo estas tiel aĉ-aspekta, ke se mi estintus ŝercdesegnisto de kontraŭ-Esperanta ĵurnalo, mi ankaŭ desegnantus Zamenhof tiamaniere!

LKK ree aludas, ke mia rubriko estas rasista.


Se ekzistas adjektivo 'rasista', tio nepre devenus de substantivo 'rasisto', sed kio je diablo estas rasisto? Bakisto bakas, kuiristo kuiras ktp. Bakante, kuirante - ili ĉiuj produktas ion. Se temas pri agado oni povas diri, ke ili fabrikas mangaĵojn t.e. komercaĵojn. La kantisto kantas kaj la muzikisto muzikas. Ili ja ne produktas ion videblan, sed tamen oni tion - agrable aŭ neagrable - rimarkas pere de la oreloj.

Sed, kian objekton, rasante, la rasisto produktas? Alivorte, kiujn komercaĵojn li ekestigas? Tute nenion!!

La rasismon (= denuncanto) estas kvazaŭ filosofulo, kiu klopodas kapti neekzistantan nigran katon en dense malluma ĉambro kaj intertempe, priskribas ties ĉiujn ecojn! Rasisto, do, estas iu aŭ io, kio ne ekzistas kaj Esperanto/English Dictionary de Millidge samopinias ĉar tiujn vortojn (rasisto, rasista, rasismo) mi ne trovis en ĝi. Do, LKK, skribu pri io, ne pri nenio!

La rasisman temon - laŭ ĉilanda dirmaniero - "oni jam kurb-dorse rajdis". Tiuj prirasismaj filosofuloj do iru serĉi alian temon (ĉevalon).....

E.S. Venter



VENTERAĴOJ

:Ĉe Tongaat en Zululando loĝas 43-jara Anton Makhanya, kiu pezas 115 kilogramojn, laboras ĉe fabrikejo kie li deĵore funkciigadas ian levaparaton, sed famiĝis pro tio, ke se necese, li kapablas formanĝi grandajn kvantojn da manĝaĵo.

Foje, ĉe amika festeno, oni daŭre alportis porciojn nur por rigardi lin malaperigi ĉion. Je la fino oni kalkulis, ke li estis englutinta iom malpli ol 18 kilojn da viando, iom malpli ol 6 litrojn da biero kaj ceterajn.

Responde al demando, li deklaris, ke malsata li formanĝos tutan kapron kaj okazis veto tiurilate. Iu zorge elektis kaprokorpon de precize 20 kibj kaj kuiris ĝin. En piedpilka ludejo li 'atakis' la kapron kaj je ĉeesto de vetanta vidantaro de ĉirkaŭ 200 homoj, dum 2¼ horoj, formanĝis ĉion!

:Multaj aferoj de la blankuloj estas enigmoj al la nigruloj. Ekzemple, la blankuloj, skribinte kelkajn vortojn sur paperpecon rajtas ricevi tiom da mono kiom tiu deziras de banko. Kio estas eĉ pli stranga al ili estas, ke blankuloj disponas elektrajn fornojn endome sed foje senkaŭze preparas manĝaĵojn eksterdome. Sudafrikaj blankuloj ŝatas havi amikajn tielnomatajn "braaivleis" kunvenojn kie eksterdome kaj super malferma fajro aŭ ardaĵ karboj ili rostas viandon aŭ kolbason simile al la usona "barbecue". Iu tre scivoleme demandis "kial la pastroj neniam al ni rakontis pri tiu flanko de la kristana religio".

:Sinjorino vizitis amikinon kaj dum la interbabilado eligis mamon por nutri sian bebon. La amikina fileto, kiu neniam antaŭe vidis bebon mamnutrata scivoleme demandis kion faras la sinjorino. La respondo estis: "Mi donas al ŝi sian laktan." Montrante al la alia mamo, li ree demandis "Ĉu tio estas ŝia teo?"

E.S. Venter (el diversaj gazetoj)

MEDICINA PROGRESO - BENO AŬ PROBLEMO?

La tipa maljuna homo estas sepdek-kvinjara kaj loĝas sola en multehoma centro. Li estas pli aĝa, prospera kaj bone edukita ol liaj gepatroj en siaj vivjaroj. Tamen, se sociaj kondiĉoj ne multe pli favoriĝos, kaj tio baldaŭ, ili verŝajne riskas deprimon, alkoholismon kaj sinmortigon.

Tiun ĝeneralan bildon evidentigis esploro organizita de la International Social Security Association (ISSA) antaŭ nelonge.

Kvindek spertuloj el dek ok landoj esprimis sian opinion pri la organizado kaj financado de longtempa prizorgo de maljunaj kaj nekapablaj homoj. Homoj sesdekjaraj aŭ pli aĝaj trovas sin en la plej rapide kreskanta grupo, kiu atingos 1 100 milionojn en la jaro 2025 - kvinobla plimultiĝo ekde 1950. Medicina progreso en la regado kaj forigo de malsanoj antaŭe mortigaj plilongigis la vivodaŭron de multaj ĝis stato kie ili fariĝas pli artritaj, kormalsanaj, mensproblemaj kaj ofte nekapablaj. Ĉar la nuntempa homo vivas pli longe, malsanoj kiuj, troviĝas pleje en mezaĝuloj kaj maljunuloj jam estas statistik-gravaj kaŭzoj de dependo aŭ morto.

Malsanoj medicine regataj sed ne forigataj rapide plimultiĝas. Tiaj kondiĉoj dolorigas kaj malfeliĉigas suferantojn dum jardekoj kaj serioze influas ties kapablecojn. Rezulte, longtempa prizorgo restas daŭra bezono. Necesas medicinaj, sociaj, financaj kaj personaj atentoj, por doni al ili maksimuman sendependon, kaj samtempe prizorgi la bezonojn en homaj cirkonstancoj kaj ĉirkaŭaĵoj, kaj permesi al ili morti pace kaj dignoplene.

La pezo de tia prizorgo estas tre reala defio al ĉiuj generacioj kaj landoj.

La bezono por urĝa reformo pro la vastaj tutmondaj ŝanĝoj demografiaj gajnis grandan publikan rekonsciiĝon nur post la United Nations Assembly On Ageing okazinta en Vieno en

la pasinta jaro. La kongreso de ISSA montris kiom ni devos progresi por fari sinmortigon malpli preferinda kaj alloga al niaj izolitaj aĝuloj. Multaj landoj pritraktos siajn proprajn solvojn per naciaj konferencoj tiutemaj dum la venonta jaro.

LA INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ (ILEI)

Dum la ĉi-jara ILEI kongreso la asembleo de 53 partoprenantoj aprobis la jenan rezolucion:

"La 17-a Konferenco de ILEI kunvenante en Sintra, Portugalio, de la 14-a ĝis la 22-a de julio 1983 al kiu apartenis reprezentantoj de 14 landoj okupiĝis pri la temo: ETNAJ LINGVOJ EN EŬROPO KAJ ESPERANTO.

- Konsiderante la entute 62 funkciantajn lingvojn en Eŭropo kaj
- konstatante, ke la anoj de la granda plimulto de lingvoj, nome 58, devas lerni unu aŭ eĉ plurajn de la plej disvastiĝintaj lingvoj kiaj estas la germana, franca, rusa aŭ la angla, sed
- rekonante la bezonon de komuna dua lingvo kaj
- observante la jam estiĝantan dulingvecon en direkto de la angla lingvo,

a v e r t a s

pro la probablaj negativaj sekvoj kaj konsekvencoj por ĉiuj ceteraj 61 lingvoj en Eŭropo.

La fakto de la jama disvastiĝo de unu lingvo en Eŭropo aŭ en la mondo estu mezurilo por ĝia agnosko kiel oficiala komuna dua lingvo.


- Substrekante la gravecon, ke pri elekto nur estu decidite post profunda kaj detaligita diskutado en respondecaj lingvaj komisionoj, la 17-a Konferenco de ILEI

(ILEE: de p. 24) p r o p o n a s

al la neŝtataj organizaĵoj en UNESKO interkontaktiĝi por interŝanĝi opiniojn kaj ideojn pri tiu ĉi lingva problemo.

Ĉiu ebla solvo garantiu la vivkapablon de ĉiu lingvo en Eŭropo."

ILEE, fondita en 1949, havas sekcion en Sudafriko nome Sudafrika Ligo de Esperantistaj Instruistoj (SALEI). Kvankam ĉirkaŭ dudek profesiaj instruistoj en Sudafriko estas ankaŭ Esperantistoj, SALEI ne aktivigas kontentige, spite de la fakto, ke ĝi estas jam 5-jaraĝa. La prezidanto de la ligo bonvenigas kaj instruistojn kaj ne-instruistojn. Vidu la anoncon sur paĝo 31.

AL LA REDAKTORO 
P.O. BOX 12271
CENTRAHIL
6006

Kelkaj personoj ensendis gratul-esprimojn pri la nova aspekto de la antaŭa eldono de Bona Espero. La redakcio dankas al tiuj. Jen kelkaj elĉerpaĵoj:

"...mi gratulas vin pri la unua numero de la novaspekta BE..." F.M. Woolf, Kaburbo

"...ĝi aspektas pli bela ol ni imagis... Gratulojn!"
C. Beckford, Kaburbo

"...mi gratulas vin pri la nova numero de BE. Ĝi aspektas bela..." O. Sher, Pretorio

"...mi gratulas vin kaj s-inon Fouché pri via unua numero de Bona Espero. La nova formato, kaj enhavo, plaĉas al mi.....deziras al vi kaj via sub-redaktorino ĉion bonan....." J. O'Shea, Oranjezicht

(al p. 31)

(Nova Grupo: de p. 13)


La grupo jam tre aktivas kaj dum majo kaj aŭgusto aranĝis prelegojn, kiujn oni anoncis per afiŝoj pruntedonitaj de SEA. Favora artikolo poste aperis en la studenta revuo "Die Perdeby". Samtempe kun la universala kongreso stariĝis ekspozicio en la universitata biblioteko kaj multaj homoj treege interesiĝis. Post ĉi tiu ekspozicio la societanoj donacis al la bibliotekestro subskribitan poemaron de la tre vaste konata sudafrika Esperanto-poeto, Edwin de Kock.

Laŭ la prezidanto, la societo havas multajn planojn por la estonteco. Elementa kurso estas jam aranĝita por aŭgusto. La estraro bonvenigas ideojn kaj sugestojn.

La societa adreso estas:

ESPERANTO-TUKS
Privaatsak X6
Brooklyn
0011

Deák László, Str. Mester N81019, R-4174 Pargă, Rumanio.
13-jara.



Hana Stenecková, Govoruva
4581, 430 04 Chumotov, CS-
Ĉeĥoslovakio. Pri diversaj
temoj. 26-jara.

Hassein Meyari, P.O. Box
488, Karaj, Iran. Sudafri-
kaj aferoj.

ANGULO POR KORESPONDEMULOJ

Diana Iskрева, str. Kiril
i Metodij 77a, ap. 27, Stara Zagora, Bulgario estas 19-
jara instruistino. Ŝi deziras korespondi kun geknaboj
diverslandaj.

NOVAJ LIBROJ



Konciza Katalogo de Esperanto-Poŝtmarkoj: Listo de aperintaj poŝtmarkoj kun Esperanto-temo. Prezo 1,20 gld. 10-paĝa.

Lingva Esenco de Esperanto: A.D. Atanasov. Popularstilaj artikoloj pri ĝenerale esperantologiaj temoj k.e. fonetiko, pasivaj participoj, propraj nomoj, sinonimoj kaj homonimoj, interjekcioj k.t.p. Prezo 27,00 gld. 175-paĝa.

Transdorsŝeto: J. Novák, V. Hník. Fakaj traktoj de la transdorsŝeto en ĵudo. Prezo 5,40 gld. 70-paĝa.

Verda Koro: J. Baghy. Ankoraŭfoja eldono de la fama, facila romaneto el la vivo de esperantistoj ekzilitaj el Siberio. Por komencantoj kaj daŭrigaj kursoj. Prezo 12,00 gld. 104-paĝa.

Mendu pere de SEA aŭ rekte de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Por UEA aldonu sendokoston: sub la valoro de 200 gld - 20%, super 200 gld - 10%, minimuma sendokosto estas 5,00 gld. Por SEA kontaktu la kasiston.





LA FIERA MULTKOLORA KATETO

Tiu ĉi porinfana bildlibro kun 38 koloraj pentraĵoj priskribas, kiel iu multkolora kateto ne respektas alies laboron, malestimas ĉion kaj pro tio ĝi renkontas ĉie obstaklojn. Fine ĝi vidis sian eraron.


38 paĝoj 18 cm. × 20.7 cm.

Prezo: £ 0.22 US\$ 0.40 SEA aŭ BEA

SOLVO AL

ARITMETIKA ENIGMO

2	=	4	÷	8
×		÷		-
4	÷	2	=	2
=		=		=
8	-	2	=	6



Britio: 45-minuta programo pri Esperanto en la brita nacia radio (BBC) provokis iom malpli ol du mil informpetojn pri la Internacia Lingvo.

Acoroj: Post anoncoj kaj artikolo en loka ĵurnalo, jam de novembro funkcias Esperanto-kurso en Ponta Delgada, Acoroj. Juna braziliano gvidas dudek kvin lernantojn - konsiderinda nombro por tiu malgranda portugala insularo en Norda Atlantiko!



Svedio: Iom pli ol simpla 'Esperantostrato' fariĝis la nove nomita 'Esperantogatan' en Malmö, ĉar ĝi estas ankaŭ la finhaltejo de urba aŭtobusa linio.

NEKROLOGO

Mortis 1983-03-15 s-ro H. Konwiser, membro de la Johannesburga Esperanto-Asocio kaj Sudafrika Esperanto-Asocio. Be-daŭrojnal lia vidvino kaj infanoj.

ANONCOJ

Vizitkartoj kun Esperanta sinmontro. Kontakto Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, Florida Glen, 1710.



Nova afiŝo por via varblaboro. Bluverda kaj nigra preso sur dika blanka papero. 29,7x43 cm. Foto kaj spaco por loki nacilingvan tradukon de "por agrablaj renkontiĝoj" (kiu ankaŭ aperas sur la afiŝo), informojn pri venonta kurso aŭ informvespero, kaj telefonnumeron. Mendu de la Libroservo de UEA po 3,00 gld. Aldonu sendokoston por 10 ekzempleroj, kio estas la minimuma mendokvanto. Triona rabato ekde tridek ekzempleroj.

Esperanto-TUKS estas nove formita universitata societo. Ĝia adreso estas: ESPERANTO-TUKS, Privaatsak X 6, Brooklyn, 0011; Prezidanto - S-ro J. Hammes.

La radio-programero 'A Universal Language' elsendita la 23-an de majo de BBC (Anglio) estis reaŭdigata la 9-an de septembro je 11h00. BBC petis ricevon de eltondaĵoj pri la elsendo aperigitaj en eksterlandaj gazetoj. Se vi povas komplezi, bonvolu sendi al Alan Wilding, BBC, Broadcasting House, London, W1A 1AA, Anglio.

La Esperanta Ŝak-Grupo Hungara okazigos olimpikon, kiu estos la unua en la Esperanto-movado. Okaze de la historia turniro, olimpikan kaj Esperanto-memorejon oni estigos en Esperanto Strato en la urbo Kalocsa.

Radio Esperanto de Francujo deziras fari elsendon pri la Esperanto-movado en Sudafriko. Iuj personoj, kiuj povas helpi iumaniere, bonvolu kontakti: Radio Esperanto, 145 Amelot Strato, F-75011 Parizo, Francujo.

(al p. 31)

(Anoncoj: de p. 30)

Por reklami la 69-an Universalan Kongreson en Vankuvero, Kanado, 1984, la LKK pretigis limigitan kvanton da ofici-alaj kongresaj insignoplingoj. Ili estas unika kanada fabrikaĵo el arĝentizita metalo (proksimuma grandeco 22 x 17 mm.) kaj montras la kongresan simbolon (indianan totemfoston) kun la vortoj "69-a UK de Esperanto"; en la fono estas verdkolora kvinpinta steleto. La pingloj jam nun estas haveblaj ĉe la Oficejo po ĉ. R5,00.

Aliĝu per R5,00:

SALEI (Sudafrika Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen.

Esperanto-kurso tute sonbenda (neniuj libroj) kaj konceptita por blinduloj, sed utila al ĉiuj Esperantistoj estas havebla por R105. "Post la Kurso" de Wilhelm kaj Hans Lingen estas eldonita de la Esper-

anto Blindenverband EV (germana) kaj konsistas el naŭ kasedoj po 90 minutoj sur superkvalitaj sonbendoj kun garantio. Kontaktu s-ron A. von Blottnitz, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen. Telefono 011 272363 hejme aŭ 011 8025280 dejore.



(ĉirkaŭ kvarobla grandeco de la vera insigno)

(Leteroj: de p. 25)

"...gratulojn pro la bona komenco, kiun vi jam sukcesis fari. Mi deziras al vi kaj s-ino Fouché multan pluan sukceson..."

W. Appel, Alberton

"...gratulojn kaj multan dankon pro la tre belaspekta, vigla kaj juneca eldono de Bona Espero...!" A. von Blottnitz, Florida Glen



ATENTON ATENTON ATENTON ATENTON

Bona Espero havas novan adreson

Sendantoj de gazetoj ktp
bonvolu noti la novan adreson
redaktoran

Cobus Zeelie
P.O. Box 12271
Centrahil
PORT ELIZABETH
6006

(South Africa)

ATENTON ATENTON ATENTON ATENTON

Lastminutaj gratuloj ankaŭ de E. de Kock, Bon Accord;
M.A. Marreiros, Johannesburgo.

69^a Universala Kongreso de



TELEGRAFA ADRESO:
ESPERANTO VANCOUVER

TELEFONO DE LA PREZ. DE LKK:
 (604) 656-5283

68-A UK: BUDAPEŝTO 1983 ✓

La plej granda UK ĝis 1982 estis tiu en Nürnberg 1923, kiam 4 963 kongresanoj partoprenis. Tamen, per la UK en Budapeŝto 1983, estiĝis nova rekordo. Pli ol 5 010 personoj aliĝis kaj la 5 000-a estis: Gabriele Corsetti de Roma, Italio!

69-A UK: VANKUVERO 1984

Verŝajne jam estas konata al vi, ke la venonta Universala Kongreso okazos en Vankuvero, Kanado. Vankuvero estas la plej granda urbo de la provinco Brita Kolumbio. Ĝi estas vigla centro de negocado, industrio, transporto. La kongresejo estas la Universitato de Brita Kolumbio. LKK planas por la kongresanoj multajn kaj diversajn ekskursojn per boato, aŭtobuso, funikularo, vaportrajno kaj piede.

Se vi deziras aliĝi aŭ iom ricevi plian informon, komuniku kun UK de Esperanto, 53 North Boundary, Vancouver B.C., Kanado V5K 3S4. Vidu ankaŭ la anoncon ĉi-supre.

La antaŭkongreso okazos la 14-a ĝis 20-a de julio en Montrealo. Informo de Esperanto Societo Kebekia, Louise Labelle, 10617 Oscar, Montrealo, Kebekio, Kanado H1H 5J8.

Esperanto

VANCOUVER



**ADRESO DE LA LKK:
53 NORTH BOUNDARY
VANCOUVER, BC
CANADA V5K 3S4**

JARKUNVENO DE LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

La 20-a jarkunveno de la Asocio okazos dimanĉon la 25-an de marto 1984 je 14h30 ĉe s-ro H.W. Appel, 8 St. Michael Road, New Redruth, Alberton 1450. Telefono (011) 869-4031.

TAGORDO

1. Antaŭa protokolo kaj traktado de aferoj estiĝantaj el ĝi
2. Raporto de la Prezidanto
3. Raporto de la Sekretario kaj pritraktado de korespondaĵoj
4. Raporto de la Kasisto
5. Elekto de nova Estraro
6. Aliaj aferoj

Mi petas, ke oni sendu al mi, kiel eble plej frue, nomojn de membroj, kiujn oni deziras proponi por elekto al la nova komitato/estraro, kun ilia konsento agi se elektitaj. La nunaj komitatanoj estas petataj informi min ĉu aŭ ne ili konsentas al refoja elekto por plua jaro.

Membroj, kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon estas petataj ensendi siajn komentojn, opiniojn, ktp por ke oni povu pritrakti ilin sub la ĉi-supra ero 3. Mi speciale deziras ricevi raportojn pri Esperanto-agado de la diversaj grupoj

tra la lando.

La financa raporto por la jaro 1983 aperos en la venonta numero de Bona Espero.

La Prezidanto, Estraro kaj Komitatanoj deziras al niaj membroj, kiel ankaŭ al ĉiuj legantoj de Bona Espero feliĉan kaj prosperan novan jaron, en bona sano kaj en paco.

O. Sher
Sekretario


MALLONGE EL LA SEA-KUNVENO: 83 10 20

- : Afrikansa lernolibro pri Esperanto estas survoja.
 - : Oni skribis leteron al la poŝtoficiistoj pri la aperigo de poŝtmarko Esperanta en 1987 - la centjara datreveno de la Internacia Lingvo. La nigrulaj ŝtatoj ankaŭ estos kontaktataj ĉi-rilate.
 - : Samtempe kun la centjara datreveno okazos SEA landa kunveno en aŭ apud Pretorio. La temo estos 'Interlingvistiko'. Prelegos kaj Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj, internacilingve kaj nacilingve. Ideojn al la sekretario de SEA.
-

Pasporta Servo de TEJO




Ĝi donas 561 adresojn en 50 landoj, kie senpage aŭ mal-multekoste tranokti. La nova eldono prezentas pli da adresoj ol kiam ajn antaŭe, ĝi krome unuafoje inkluzivas mapojn. Kaj la prezo estas rekorde malalta! Pro tio, membroj de TEJO ĉi-jare ne ĝuas rabaton. La libreto (kaj la rajto uzi la servon) kostas 6 germanajn markojn inkluzive sendokostojn (aŭ 5 irpk) de HAPS, p/a Germana Esperanto-Junularo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1. La pagon vi povas ĝiri al GEJ ĉe konto 337 17-201 (Hamburgo). Ĝi estas aĉetebla ankaŭ ĉe multaj landaj perantoj, kaj de la libroservo de UEA (prezo 6,90 gld. sen sendokostoj).



LA ESPERANTO-TURISMO OFERTAS

- ☛ unikajn homajn interrilateblecojn
- ☛ 4 000 delegitojn en pli ol cent landoj
- ☛ 500 adresojn en 50 landoj, kie eblas esti senpage gastigata
- ☛ 500 internaciajn renkontiĝojn en 40 landoj, listigitajn en la Turisma kalendaro
- ☛ sian fak-organon = plej fruktodona ideobanko
- ☛ informkoverton: "Turismo nia bonŝanco" kontraŭ 2 IRK aŭ sendeviza egalvaloro

Informas: **MONDA TURISMO**
Montoyerstr. 37 b24
B-1040 Bruselo, Belgio




BBC kaj Esperanto

BBC (Brita nacia radio) disaŭdigis 7-minutan raporton pri Esperanto okaze de la U.K. Temis pri programero en regula duon-hora programo "From our own correspondent" (De nia propra raportisto) matene la 12-an de julio, en kiu la mez-eŭropa raportisto de BBC telefonis pri la baldaŭa Kongreso kun 5000 partoprenantoj kaj tre klare donis specimenon de Esperanto:

"Esperanto estas facila lingvo kaj ĝi povas helpi internacian interkompreniĝon".

Li diris i.a., ke hungaroj estis ĉiam je la antaŭo de la movado; ke 100.000 lernas en Ĉinio, kaj ĉinoj speciale interesiĝas pro la eblecoj por rapida scienca interkomunikado; ke la antaŭa usona ambasadorejo en Irano, kie oni enfermis la ostaĝojn, estas nun Esperanto-lernejo; ke oni bezonas dekoblan tempon por lerni la anglan; ke ĝi estas majstroverko, kiu multe evoluis dum preskaŭ 100 jaroj kaj prezentas praktikan solvon por multaj el la mondaj komunikadaj problemoj. Fine li demandis, kian ŝancon ĝi havas kontraŭ la nehaltigebla disvastigo de la angla — la esperantistoj ŝajne ne maltrankviliĝas.

La tuta programo estis reel-sendita samtage posttagmeze, dum oni atendis la komenciĝon de la parlamenta debato pri la ebla reenkonduko de la mortpuno.



ISSN 0006-7024

SUD-AFRIKO SEA